



1(146)
2014

Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo ESPERANTO

Bultenon redaktas: ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,
Adreso por korespondi: str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

Esperantina Mirska, Lidia Ligeza

Novjaraj bondeziroj

Sur neĝofloko blanka
Kaj luna lum' radia
Alvenis Nova Jaro
Al ĉies domo nia.

Gardu elkore ambaŭ
Mirindajn praavinojn;
Malsanojn kaj ĉagrenojn
Ekzakte eliminu.

Brakumu kore Anjon
Kaj Franĉjon; al ĉi paro
Donu prosperon, sanon,
Bonstaton – sen avaro.

Alvenis Nova Jaro
Sur nian belan Teron
Portante kor-donacojn:
Feliĉon kaj esperon.

Korpremu la sinjoron
Andreon; li kapablas
Revenĉi per versaĵoj
Instruaj kaj diablaj.

Per via graco ŝirmu
Martan, scivolan inon,
Certigu al ŝi librojn,
Ankaŭ en la latino.

Kaj ni kun arda peto
Etendis al ĝi manon:
Donu Novjaro kara
Pacon, trankvilon, sanon!

Memoru pri la Granda
Stanjo kaj al ŝi donu
Feliĉon, sed pro kartoj
Afable ŝin admonu.

Alte taksu Adamon,
Ĉiun lian intencon
Efektivigu tuje,
Por korpo kaj por menso.

Donu kvieton dolĉan,
Prudenton al la homoj,
Ekregu pac' en l' mondo
Kaj pac' en ĉiuj domoj!

Kaj ne forgesu Stanjon
Malgrandan; la falangon
Da ĉio al ŝi donu
Kaj plue akran langon.

Ankaŭ zorgu pri Lidia,
Por ŝi konservu forton
Plu puŝi la ĉarumon
De l' esperanta sorto.

Peteme ni etendis
Ĉiujn kvar niajn manojn:
Prizorgu, ho, Novjaro
Niajn samideanojn!

Favoru nian Bronĉjon,
Por li sane, senbare
Regalu nin per l' pensoj
Ofte kaj malavare.

La atenton meritas
Ankaŭ Vlaĉjo Opoka.
Kvankam ne en klubejo,
En sci' li estas roka.

Pri Granjo nia kara,
Fortika fundamento
De nia forta grupo
Memoru kun korsento.

Kaj al Ala oferu
Bukedon de sukcesoj,
Por ŝi sentu la vivon
Kiel dolĉan kareson.


Al amata Johana
Donu paciencon, sanon
Kaj bonŝancon aperi
Inter samideanoj.

Kun elkora sentemo
Ekpensu pri Igoro;
Kvankam troviĝas fore
Meritas li memoron.

Al Granjo dua portu
La inspiron muzikan
Kaj feliĉon pro hundo,
Ankaŭ pro rond' amika.

Kaj helpu Eduardon
Kapablojn sperte uzi,
Sed ankaŭ lin konvinku,
Ke li rajtas amuzi.

Permesu al Jadvinjo
Sane reveni domon
Kun bonstataj aĉetoj
Kaj valizo da mono.



Ne forgesu Andreon,
Kvankam ni emas vei
Pro nulo da vizitoj.
Ĉu li volas kabei?

Kaj Joakimon gardu
Kontraŭ mava tent-aro;
Li vivu gaje, studu
Kaj ludu je gitaro.

Al nia kara Danjo
Donacu bonon, belon,
Kontenton pro ekzisto
Kaj esperanta stelo.

Certigu pli da tempo
Al nia Miĉjo spita
Ĉar li el ĉiuj homoj
Estas plej okupita.


Novjaro kvankam petojn
Ne emis tuj plenumi,
Sed almenaŭ promesis
Pri ili ekcerbumi.

Anjo, Zbiĉjo kaj Banjo
El frata por ni rondo
Vivu senzorge, bele,
Ĝoju ilin la mondo.

Favoru Magdalenan
En instruo kaj gvido,
Agado por ILEI
Sen malica insido.

Memoru pri Tobio
Nia juna espero,
Donu al li sukceson
En ĉia vivo-sfero.

Feliĉaj lumu steloj
Por Adam kaj Markéta,
Realigu por ili
Ĉiu bezon', eĉ eta.



La pola Kristnasko

Kristnasko apartenas al la plej gravaj festoj de kristanismo. Ĝi estas celebrata 25-an de decembro omaĝe al la naskiĝo de Jesuo Kristo en judea urbeto Betleĥemo. La dato tamen ne estas historia; oni enkondukis ĝin en la IV-a jarc. por forigi feston de naskiĝo de la Nevenkebla Suno (Sol invictus), aŭ dio Mitrao. Kulto de Mitrao, dio-Suno, mitraismo devenis de unu el religioj de antikvaj irananoj kompletigita je elementoj de kredoj ĥaldeaj (ekz. kultoj de astroj) kaj posedanta komunan kun mazdaismo konvinkon pri senmorteco de la animo. En iranaj mitoj gravis ligoj inter la Suno kaj virbovo kiel simbolo i.a. de la Suno, fajro, viv-fortoj, energio, kuraĝo, avido kaj sovaĝo. En mitraismo dio Mitrao mortigis la pravirbovon, bildon de la kosma fekundo, el kies karno elkreskis ĉiuj plantoj kaj bestoj. Ofere el virbovo kaj bapto per ĝia sango (permesata nur por viroj) rolis en mitraismaj misterioj celebrataj de I-a jarc. antaŭ Kristo ĝis V-a jarc. de la nova erao. Kiel dio de la sekreta religio Mitrao gajnis multajn adeptojn ekster limoj de Irano. En III-a kaj IV-a jarc. de la nova erao mitraismo estis la ŝtata religio de Romo kaj forte rivalis kun kristanismo. Grandiozan, subteran templon de Mitrao apertan por viziti antaŭ rilate nelonga tempo ni povas admiri inter historiaj restaĵoj de la nuntempa Romo. Nenio do stranga, ke kristanismo devis kontraŭstari al mitraismo kaj unu el la efikaj rimedoj estis fiksi la naskiĝdaton de Jesuo anstataŭ naskiĝdato de dio de la pli frua kulto.

Du tagojn de Kristnasko-festoj antaŭigas trisemajna periodo de atendado nomata Advento, kiun finas grava tago de Vigilio, la 24-an de decembro. Ĝia tradicia celebrado daŭras en Pollando

ekde XVIII-a jarc. En certaj regionoj ĉi tago nomiĝas ankaŭ Steleto, por rememorigi la kometan stelon, kiu gvidis tri reĝojn-saĝulojn al la betlehema stalo. En ĉiu katolika hejmo ĉi-tage okazadas la solena vespermanĝo, kiu komenciĝas tuj post krepusko, kiam sur la vespera ĉielo aperas la unua steleto pro la sama okazo.

La tuta familio lokiĝas ĉe la tablo kovrita per blanka tablotuko, sub kiu troviĝas seka, bonodora fojno, kio enkondukas etoson de Kristnasko kaj rememoron pri trogeto, en kiu kuŝis la novnaskita Bebo Kristo. La tablo estas ornamita per kandeloj, floroj kaj festa manĝitaro. En Pollando oni metas la kroman teleron por neatendita gasto. Pli frue ĉi-forme oni intencis gastigi spiritojn de la amataj mortintoj. Unue la patro de la familio aŭ alia estimata parenco legas fragmenton de Sankta Skribo, plejparte priskribon de Kristnasko laŭ evangelio de S-ta Luko. Poste ĉiuj preĝas, precipe por animoj de mortintaj familianoj. Nun venas la plej grava parto de la solenaĵo – Oblato (fracio panis) aŭ rompado de la pano. La familianoj rompas kaj dividas oblatojn kaj bondeziras ĉiu al ĉiu ĉion la plej bonan. Ĉi tradicio devenas de la komuna vivo de unuaj kristanoj. Ĝi simbolas unuigon de la homo kun Dio kaj unuigon de la proksimuloj. Oblato – la ofera dono (lat. oblatum) estas de mezepoko bakita el la plej luksa, tritika faruno kun aldono de akvo. Faris tion monaĥoj en multaj klostroj. Fera tenaĵlo, sur kiun oni verŝis la paston estis riĉe ornamita. Pollando famis pro metiejoj, kiun provizis klostrojn en pli kaj pli interesaj kaj artistaj formoj por baki oblatojn.

Ĝis nun oblatoj prezentas la simbolajn bildetojn kiel Bebo Jesuo, Trogeto, Stelo, Anĝeloj, la Sankta Familio ktp. Ekzistas kutimo sendi peceton de oblato al la parenco aŭ amiko, kiu estas fore. Dum la deviga neĉeesto ĉe la familia, vigilia tablo – pro milito aŭ politika ekzilo tia oblato estis granda konsolo.

La vigilia vespermanĝo estas en Pollando senvianda kaj plej parte konsistas tradicie el 12 pladoj preparitaj laŭ malnovaj preskriboj. Kutime oni kredencas fungan supon, ruĝan barĉon kun ravioloj farĉitaj per fungoj, kuiritajn terpomojn, rostitajn fiŝoj (la plej ofte karpojn), fazeolon kun butero, brasikon kun pizo, brasikajn pasteĉojn, papavajn farunbulojn, en orientaj regionoj kution (deserton el tritiko, papavo, nuksoj kaj aliaj frandaĵoj kun mielo), kompton preparitan el sekigitaj fruktoj – prunoj, pomoj kaj piroj, mielkukojn kaj aliajn dolĉaĵojn. Alkoholo ne estas rekomendata, sed tamen uzata en ne tro granda kvanto.

La simblan signifon havas pladoj kun papavo. Papavo povas simboli multo da aferoj, sed por kristanismo esenca estas kiel simbolo de fekundo, malscio, indiferento, ankaŭ ĉasteco kaj virgeco, ĉar pordorma agado malebligas pekojn de la avido. Papavaj kapetoj bildigitaj sur preĝejoj benkoj povas signifi la resurekton. Post la manĝado oni kantas diversajn, en Pollando precipe abundaj kantikojn kaj pastoralojn.

Por amasigitaj infanoj la plej interesa estas la kristnaska laboro, nun ofte artefarita, sed tradicio preferas la vivantan – abion, piceon, rare pinon, sur kiu pendas dolĉaĵoj, fruktoj, briletaĵoj, bobeloj, lumetoj kaj ludiloj kaj lumas elektraj ampoletoj aŭ jam tre rare kandeloj. La laboron ornamitan per pomoj por rememorigi la malpermesitan frukton de Edeno oni observis la unuan fojon en Alzaco, en XV-a jarc. En Pollando abietoj ornamitaj per kandletoj kaj steletoj aperis fine de XVIII-a jarc. en luteranaj medioj kaj en grandaj urboj. Ekde la XIX-a jarc. la kristnaskaj laboroj staris jam preskaŭ ĉie – pli riĉe ornamitaj ĉe aristokrataro kaj ĉe bonstataj, urbanaj familioj. En vilaĝoj la abieto aperis malfrue, la plej frue en Silezio kaj Grandpolujo, ĵus en la intermilita periodo. Anstataŭ laboro oni dismetadis sub vigilia tablo pajlon kaj fojnon, kaj en angulo starigadis garbon de nedraŝita greno, por certigi al si bonan rikolton en la venonta jaro. Submontaj regionoj konis pendigitan sur plafono, detranĉitan pinton de piceo aŭ branĉon de pino dekoritajn per ornamoj faritaj el diverskoloraj oblatoj. Kurpanoj pendigis sur plafono grandan araneon faritan el papero, plumetoj, pajlo kaj pizo.

Kiam Vigilio jam finiĝis la vilaĝaj mastroj kun resto da manĝaĵoj kaj kolora oblato iris al staloj kaj bovejoj por dankeme nutri bruton, ĉar en Betleĥemo bovo kaj azeno varmigis trogeton de la Dia Infano. Oni kredis, ke meznokte, post ĉi regalajo ĉevaloj kaj brutaro scipovis paroli.

Sub arbo kuŝas diversaj donacoj, ne nur por infanoj, kiujn oni rajtas elpaki kaj rigardi ĵus post la vespermanĝo. Tiujn donacojn alportas depende de la regiono S-ta Nikolao, Anĝelo aŭ Stelulo.

Je noktomezo okazadas solena S-ta Meso, nomata Paŝtista, kiu strebis partopreni ĉiuj, kvankam nerare la distanco estis tre longa kaj la nokto tre frosta. Preĝejoj por la tuta periodo de Kristnasko aranĝas kripoj, ofte grandiozajn kaj inventemajn. Anoncanto de ĉi tiu kutimo estis S-ta Francisko el Asizo, al kiu la papo Honorio la III-a permesis aranĝi la kripon laŭ la propra pripenso pli klare bildiganta sentemon kaj ĝojon de Kristnasko. En la arbara groto amasigitaj fratoj kaj loĝantoj el la ĉirkaŭaĵo partoprenis la S-tan Meson inter vivantaj bestoj. Tiel formiĝis la Paŝtista Meso kaj kristnask-temaj spektakloj. Ĝis nun fratoj franciskanoj aranĝas kripoj laŭ tiu modelo.

Ekzistas lokaj kutimoj omaĝi Kristnaskon. En Krakovo fama fariĝis ĉiujara konkurso de kripoj konstruitaj laŭ la konataj objektoj de la urbo, precipe laŭ diversaj preĝejoj. En la konkurso partoprenas kripoj grandaj kaj malgrandaj, sed ĉiuj faritaj el ligno, buntaj kartonoj kaj paperoj kaj brilantaj pro stanfolio. La plej belajn arigas Historia Muzeo en Krakovo, kio poste vekas admiron de landaj kaj eksterlandaj vizitantoj de nia urbo.

La unua tago de Kristnasko estas dediĉata al la familio. Dum la dua oni vizitas amikojn kaj akceptas vizitoj de ili. Kutimo, kiu jam pereis en urboj kaj ankoraŭ daŭras en vilaĝoj estas kristnaskaj vizitoj de kantikantoj, kiuj ofte alivestitaj vagadas de domo al domo kantante kristnaskajn kantojn kaj petante rekompencojn. Antaŭ jaroj oni povis supozi la tutan spektaklon kun porokazaj tekstoj kaj kantikoj. Grupoj de kantikantoj paŝadis kun stelo kaj kripeto, ofte en kostumoj de reĝo, anĝelo, diablo, morto, judo, urulo, kaprino kaj cikonio. Ĉe kantoj, dancoj kaj muziko ili bondeziris al la mastroj sanon, bonstaton kaj bonan rikolton, pro kio ili ricevadis pagon. La komuna gaja amuzo ne havis la finon. Simile oni bondeziras okaze de la Novjaro.

La tempo de Kristnasko finas festo de Tri Reĝoj (Magoj, Saĝuloj) aŭ Epifanio. Evangelioj ne notis iliajn nomojn; ĵus en X-a jarc. ili ricevis nomojn Gasparo, Melkioro kaj Baltazaro. Ili migris de Persio por omaĝi la novnaskitan Kriston kaj donaci al Li mirhon, incenson kaj oron. Ĝis nun la 6-an de januaro oni benas incenson pro bruligi ĝin en la hejmo (kio certigas sanon) kaj kreton, per kiu oni skribas sur pordo aŭ proksime de alirejo literojn K+M+B kaj ciferojn de la jaro kiu ĵus komenciĝis. Ĝenerale oni opinias, ke ĉi literoj ligiĝas kun komenco de la reĝaj nomoj, sed vere ili estas komenco de vortoj en la frazo „Chrystus Mansjonem Benedicat”, kio signifas la peton „Kristo, benu ĉi tiun loĝejon”.

Kristnaskaj polaj kutimoj apartenas al la plej multnombraj kaj plej belaj en la tuta mondo.

Alicja Sacha, Lidia Ligęza

Krakova Societo ESPERANTO

La programo de la renkontoj januare 2014 j.

- 9. 01. – Marta Michałowska. **La esperantaj aforismoj**
- 16. 01. – **La Novjara renkonto. En preĝejo al S-ta Johano, ĉe la S-ta Johano-str.7, je 14:30, poste, je 16:00 en klubejo kun prelego** de Anna Ramza-Kozioł kaj **kantikado ĉe piana akompano** de Irena Urbańska
- 23. 01. – Martin Bureš (Ĉeĥio). **Kiel memori novajn/malfacilajn vortojn**
- 30. 01. – Grażyna Porada. **La esperantaj lingvaj ludoj**